**Groningen** opinias pli celtrafa la laboro por FLE-amikaro kiam ni donos ian propagandan cirkuleron. La asocio publikigu la nomojn de la organizoj neesperantistaj, kiuj simpatias kaj subtenas nian movadon.

**Heiloo** plendas pri la demandaro. Kial oni bezonas informojn pri membreco al politika partio aŭ sindikato? Plie li konstatas la mankon je bonaj propagandiloj kaj riproĉas al la estraro, ke ĝi ne atentis la E.V.C.-kongreson. Liaopinie estas facile enpenetri la sindikatojn. Li proponas propagandi per hejmvizitado.

**Amsterdam 4** deziras propagandante Esperanton inter la publiko, paroli nur la gepatran lingvon.

**Hago** deziras, ke ni faru tion, kion ni povas pagi. Ĉu niaj propagandiloj estas taŭgaj, li opinias, ke ne, ĉar niaj afiŝoj rigardate de ioma distanco ne estas legeblaj. Oni surpresu la vorton Esperanto grandlitere. En ĉiu strato la vorton Esperanto oni renkontu. Li instigas propagandi en kunvenoj per flugfolioj. Ankaŭ la buŝa propagando estas tre grava.

La virina delegito de **Rotterdam 6** direktas kelkajn instigajn vortojn al la aninoj. Ili partoprenu aktive en la laboro por nia idealo kaj instigu siajn edzojn. Ŝi deziras, ke ankaŭ nia asocio sendu salutleterojn al la kongresoj de aliaj organizoj.

**Arnhem** deziras propagandi inter la malnovaj anoj, kiuj ne denove membriĝis. En Arnhem oni aranĝis kurson por geinstruistoj, en kiu partoprenas 8 personoj.

**K-do van Haren** respondas la parolintojn kaj informas, ke k-do Pelcman bedaŭrinde ne povis veni. LEEN havas similan rezolucion pri Esp. en la lernejo. La membroj donu taskojn al si mem. La demando al radiolimpus estis malbone redaktita. La statistikon ni nepre bezonas. Vi fidu nin. Ni bezonas la informojn por povi serĉi taŭgajn kamaradojn, al kiuj ni povos direkti nin, por efike propagandi en ties sindikato kaj partio.

*La estraro dissendis 225 atentigilojn pri nia kongreso al lab. instancoj kaj aliaj.*

**K-do van der Plank** respondas por la gazetarservo. Li laŭdas sekcion Zaandam kiel kunlaboranton. Se organizo ne invitas nin al sia kongreso ni ne povas sendi salutleteron. Li ne sukcesis interkontaktiĝi kun la EVC-estraro okaze de ĝia kongreso.

La bultenon por la gazetaro oni ne sendu al la redakcioj, sed mem verku artikolojn laŭ ĝia enhavo. Fine li petas ĉies kunlaboron por la gazetarservo.

K-do Faulhaber dankas la parolintojn kies rimarkigojn ni promesas konsideri.

**La kongreso akceptas la rezoluciojn.**

**Diversaĵoj.**

Zaandam defendas sian proponon. Post kelkaj klarigoj de la estraro la kongreso akceptas ĝin kiel deziresprimon.

**Lernolibroj.**

**K-do Faulhaber** enkondukas la temon. La evoluo de la lernolibro okupis certan tempon. Antaŭ 35 jaroj oni instruis Esperanton en 15 lecionoj, laŭ tiama devizo en tri monatoj, tamen oni bezonis 3 jarojn.

La lasta lernolibro postulas pli de la instruanto. Tio tamen ne signifas, ke ĝi estas la plej maltaŭga. Oni devas kutimiĝi al ĝi. Cetere ĝi postulas malpli da papero ol la aliaj lernolibroj. Ĉar oni ne ĉie ankoraŭ disponas pri tute kapablaj kursgvidantoj ni do konsideros, eldononte represon, la diversajn dezirojn. Ni ankaŭ nepre devas kalkuli pri la disponebla paperkvanto por tio.

Post tio la kongreso unuanime konsentas pri la estrara vidopunkto rilate la proponojn de Distrikto Noord Holland, Alkmaar, Amsterdam 3, Schagen kun la amendoj.

**Kongresloko.**
Ĉar Zuilen reprenas sian proponon, favore al Amersfoort, post klarigo de k-do Faulhaber, ke estas pli utile havi en la sekvonta jaro malpli kostan kongreson en Amersfoort kaj iri en 1949 al Gent, la propono de Amersfoort estas akceptita.
Ĉe la propono de Noord-Holland **K-do Kruit** certigas, ke laŭ eblo kaj laŭ bezono ni uzas la servojn de la distr. estraroj.

**Organizaj demandoj.**
Propono Laren—Blaricum.
**Laren** opinias, ke mankas demokratio en la asocio. La neaktivuloj regas nian organizon, ĉar multaj membroj ne vizitas la sekciajn kunvenojn kaj tamen la sekcia delegito voĉdonas ankaŭ por ili. Tio laŭ lia opinio ne estas ĝusta.
La sekr. **k-do Kruit** ripetas la skrupulojn kontraŭ la propono. Delegitoj havu liberan mandaton, ĉar en la kongreso li ja povas ŝanĝi opinion pro la diskutoj.
**Neniu montriĝis esti por la prop.**

**Rezolucio pri I.C.K.**
Nun la prezidanto voĉlegas la rezolucion pri starigo de Internacia Centra Komitato, (vidu L. E. de 1 Majo, p. 38).

**Arnhem** konsentas pri la ideo, sed avertas kontraŭ tro da optimismo. Starigante Internacian Centran Komitaton oni ne ignoru SAT.
**Bas Wels** atentigas, ke tia komitato nur povos aĝi sur tre limigita tereno.
La sekr. aludas la artikolon de k-do de Bruin, pri fondo de Centra komitato ankaŭ sur internacia tereno. Neŭtrala organizo ne estas la organizo. Ĉiu organizo restu libera, sed ili kunlaboru por komunaj celoj.
Pere de la LEA-komitato ni interkonsiliĝos pri la demando. Necesas unueca konduto kaj superregon de unu organizo ni nepre ne permesos. La Flandra Ligo Esperantista jam agas en nia direkto. Lojala kunlaboro estas dezirinda.
**La kongreso akceptas la rezolucion.**

**Budĝeto 1947.**
La Budĝeto 1947 estas akceptata post respondo de la kasisto al Rotterdam 2, ke li enkalkulis la plialtiĝon de la kotizo.

**Elekto proponkomisiono 1948.**
La kongreso elektas k-dinon Stierman, k-don van der Starre kaj k-dinon Bolander.

**Elekto kaskontrola komisiono.**
La kongreso reelektas la samajn k-dojn Spaarenberg, Kamstra kaj De Bruijn.

**Elekto konfliktkomitato por L.E.**
Reelektita. Ĝi konsistas el k-doj Preker, H. ten Hagen kaj van der Stolpe.

**K-do Koeman** (estraro) plendas pri ne sufiĉa kunlaboro de la funkciuloj en nia organizo. Ekz. oni ofte sendas monon, destinatan por L.S. sur la konton de la asocio kaj inverse. Pri ĉiu tereno la estraro spertas similajn aferojn. Oni pli bone atentu la rubrikon „Bestuursmededelingen".

**FERMO kaj Ekfunkciigo nova prezidanto.**
La fino de la kongreso alvenas kaj sekvas la solena momento en kiu la kongresprezidanto Faulhaber, transdonas la martelon al la novelekita asocio prezidanto, k-do A. F. van Haren, per la jenaj vortoj, aplaŭde substrekitaj de la kunveno:

*Gekamaradoj,*
Finiĝis la kongreso kaj finiĝis mia tasko kiel anstataŭa presidanto. Venis la momento transdoni tiun taskon al mia posteulo.
K-do v. Haren, antaŭe mi dankas vin por ĉio, kion vi kiel ĉefestrarano faris por nia organizo.
Vi montris varman interesiĝon pri ĉiuj flankoj de nia movado, precipe pri la flankoj organiza kaj propaganda.
Post la liberiĝo diversaj distriktoj kaj sekcioj havis okazon pli intime ekkoni vin, kiam vi paroladis propagande aŭ donis konsilojn pri organizaj aferoj.
Vi do ne estas tute nekonata kaj en ĉi tiu kongreso oni pli bone ekkonis vin. Kaj nia estraro konas vin jam tiom, ke mi estas konvinkita, ke ĝi ne bedaŭras la kandidatiĝon.
Mi do plenfide transdonas al vi la prezidi'on. Uzu ĝin takte kaj juste, prudente kaj objektive. Mi konsilas al vi volvi ĝin en vatojn, t.e. manipulu ĝin milde, ĉar kvankam ĉiu ano de nia asocio estas konvinkita, ke ordo estas necesa, neniu deziras senti tiun neceson en dolora maniero. Sed ne timu uzi ĝin akcente, se la bona ordo necesigas tion, kiel mi antaŭ 15 jaroj bedaŭrinde devis fari, kaj pri kio mi ankoraŭ konservis relikvon: pecon de martelo! Poste mi neniam bezonis uzi ĝin tiel, kaj mi deziras, ke ankaŭ vi sukcesos same gardi bonan ordon.
Mi esperas, ke sub via gvidado nia asocio kreskos kaj floros por la bono de la homaro kaj por la klerigo de nia klaso.
Mi petas vin, fermi la kongreson!
**K-do van Haren** dankas la eksterlandajn gastojn, nian stenografon, k-don Brugman, la O.K.K. kaj la ceterajn pro ilia ĉeesto resp. kunlaboro. Li fermas la kongreson per kelke da konvenaj vortoj kaj dankas la kongresanaron pro la kamaradeca sfero, en kiu okazis la diskutoj.
Kantinte la „Internacion" la kongresanoj disiras.



Envenis ankoraŭ jenaj salutleteroj de: Laborista Sekcio en Varsovio, Polio; Grupo „La verda stelo", Varsovio; Aŭstria esperantista federacio, „Nia vojo"; (laborista esperantistaro Wien).
Gazeto: Die Weltsprache, Vieno, kaj Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa.
(La raporton kompilis k-doj Velthove, Prins kaj Alings, laŭ stenografaĵo, de k-do Brugman).

---

**GRAFIKAJ ESPERANTISTOJ.**

En la unua postmilita L.E. aperis alvoko de tri kamaradoj, konataj en la grafika sindikato kaj en F.L.E., ke grafikaj Esperantistoj sin anoncu por helpi en la propagando de nia lingvo inter kolegoj kaj por praktiki Esperanton por aferoj koncerne nian laboron. Dekoj sin anoncis kaj post ioma konsiderado, ili kreis apartan klubon de Grafikaj Esperantistoj, al kiu aliĝu ĉiu kiu laboras en preseio aŭ parenca fako. La membroj rilatas kun kolegoj el multaj landoj kaj iam aperis 18 monataj bultenoj, kiuj krom klubaj novaĵoj estas plenaj de eksterlandaj informoj pri laborkondiĉoj, sindikataj sciindaĵoj ktp.
Por ke ni ankaŭ propagandu la lingvon inter kolegoj kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton, ni jus presigis cirkuleron (Ned. lingvan) kun ekstraktoj de eksterlandaj leteroj. Volonte ni disponas kelkajn ekzemplerojn al kiu opinias, ke li bone povos ilin uzi.
Ni ŝatas kontakti kun Nederlandaj kolegoj por propagandi nian klubon kaj, se en F.L.E. estas anoj kiuj povas kontaktiĝi nin kun eksterlandaj kolegoj, ni kompreneble kun ĝojo akceptas ties adresojn.
Al nia klubo povas aliĝi ĉiu organizita kolego, la kotizo estas minimuma: 25 cendojn en monato. Tiu ĉi pago entenas la kotizon por Internacia Grafika Esperanto Ligo kaj niaj anoj do ricevas ne nur la monatan bultenon de nia klubo, sed krom tio la organon de IGEL.

J. A. HIPPE, prezidanto.
F. B. E. TEN HAGEN, sekretario.
Nepveustraat 33, Amsterdam-W.,

**ĈU UNUOPULO FRUKTEDONE POVAS PROPAGANDI NIAN IDEALON?**

La postmilita tempo ofte montras al ni okazaĵojn, antaŭ la milito ne imageblajn. Honeste ni konfesu, ke en nia organizo ankaŭ estas konstateblaj tiaj fenomenoj.
Multaj antaŭmilitaj fidelaj membroj, pro la milito grave seniluziiĝintaj, nuntempe ne plu donas signon pri intereso por Esperanto, aliaj, kiuj tamen realiĝis ne plu kunlaboras kiel antaŭ la milito.
Sekciinformoj montras, ke multaj estas kaptataj de mistera sed danĝera influo, la inerteco. Malbenita vorto. Tamen estas eble utiliĝi Esperanton, kiam revenas la antaŭmilita aktiveco.
Laborante en ŝtata institucio, kiu sin okupas pri la ellaborado de rekonstruplanoj por Roterdamo, „Konsilejo por la Rekonstruo de Roterdamo" (A.S.R.O.) mi sciiĝis en Oktobro 1945a, ke la oficejo intencas presiĝi libretojn pri la Rekonstruo de Roterdamo, kun fotoj kaj planoj en la holanda, angla, franca kaj germana lingvoj. Malgraŭ mia peno mi ne sukcesis akceptiĝi Esperanton en tiu vico. Foje mi aŭdis, ke jura Doktoro, vizitinte Anglion por pristudi la rekonstruon de Londono k.t.p., raportis ke planoj pri rekonstruo en Anglio malfacile estas akireblaj. Aŭdinte tion, mi pere de la „British Esperantist" kaj anglaj arĥitektoj ricevis materialon. Tio tre miriĝis la kompetentulojn el la oficejo. Iom poste mi cirkuliĝis ajojn el Francio, Belĝio kaj Svedio. Kaptita pro la ideo, kaj ĉerpante forton el la konsiloj de k-do Veen, mi iom post iom kaj paŝon post paŝo aĝis. Sed tiri la atenton eĉ mi ne plu povis, ĝis kiam mi sukcesis interesiĝi la estraron de oficistara organizo, kiu pretis haviĝi al mi okazon por paroli pri Esperanto antaŭ la membraro. La unua rezultato estis, ke en Septembro 1946a, 70 kursanoj ekstudis per „La Komencanto".
La kursoj bone kaj kontentiĝe funkcias. Salonon oni tiucele senpage disponiĝis.
Intertempe la gazeto de nomita organizo enpresiĝis artikolojn pri Esperanto. Tio estis la 2a rezultato. Intertempe aperis angla broŝuro pri Roterdamo. Mi tamen daŭriĝis atentiĝi pri la utilo de Esperanto.
Mi aĉetis, kolektis kaj desegnis materialon pri la rekonstruo de Roterdamo, ĝis mi trovis kunlaboranton pli influhavan ol mi. Tiel ke ekde la pas. monato, Roterdamo donas imitindan ekzemplon al la mondo, ĉar en la konsilejo por la Rekonstruo de Roterdamo nun troviĝas „Informservo" kiu Esperantlingve interrilatas kun la eksterlando. 500 broŝuroj estas presitaj, enhavantaj priskribon pri la detruo kaj rekonstruo de nia urbo kun planoj kaj desegnoj, ĉio Esperantlingva, destinitaj por kompetentaj urbo-konstruistoj. Ili donas impreson pri niaj planoj.
Reciproke oni petas al la leganto sendi al ni samspecan materialon el propa lando aŭ (kaj) urbo.
Se montriĝos, ke el eksterlando atingos nin kontentigaj desegnaĵoj, materialo ĉiuspecan, tiam pluraj estos presataj, sed ĉar la germanaj uzurpintoj forprenis ĉiujn havaĵojn, nia komunumo ne povos elspezi multon.
La unua kvanto estas destinita speciale por fakuloj, do vi **ne** petu ekzempleron por ekspozicia fako aŭ korespondanto.
Sed se oni povos haviĝi al ni supernomitan materialon kaj estas fakulo en konstru-aŭ rekonstuado, tiukaze avertu lin pri tio.
Roterdamo do praktike ekuzas nian karan lingvon. Pluraj sekvu tian ekzemplon!

W. Borsje.

---

**Ekzamenoj.**
En Zwolle okazos ekzameno je 4a de Oktobro 1947a.



## MEDEDELINGEN BONDSBESTUUR

**F.L.E. Amiko.**

Laŭ kongresdecido ni eldonos kvaronjaran propagando-Gazeton, provizore 4 paĝan, formato de L.E. En ĝi aperos nur nederlandlingvaj artikoloj. La nomo estos *F.L.E. Amiko.* La celo estas, ke ĉiu F.L.E. amiko regule ricevos tiun gazeton senpage. La sekcioj, distriktoj kaj ĝeneralaj membroj regule alportu la gazeton hejmen ĉe la membro de la F.L.E. amikaro. Tiel vi konservas la kontakton kun ili! Cetere la gazeto servu por kolportado. La vendoprezo estu 5 cendoj. Oni pagu al nia asociokaso nur 3 cendojn. Do bone komprenu, ke nur la kvanto bezonata por la kolportado devas esti pagata. La kvanton bezonatan por viaj varbitaj kaj varbotaj F.L.E. amikoj vi do ricevos senpage. Vi do tuj al ni anoncu kiom da ekz. vi bezonas por la kolportado (do pagotaj) kaj kiom por la la F.L.E.-amikoj en via regiono (senpagaj). Tuja mendo necesas, por ke ni fiksu la kvanton. Atentu, ke nur granda kvanto efikos por la propagando kaj influas la prezon.

**La eldonota lernolibro.**

Laŭ kongresa decido nia estraro konsideris la eblojn eldoni „Nia Lernolibro" kaj interrilatis tiucele kun la aŭtoro, k-do J. Lem. Montriĝis, ke necesas sufiĉe grandaj ŝanĝoj i.a. en rilato kun la nun oficialigita nova ortografio de la nederlanda lingvo kaj ĝiaj gramatikaj konsekvencoj, tial ke ĝi fariĝus tute nova lernolibro.
K-do Lem tamen ne deziras multe ŝanĝi. Pro supraj motivoj la estraro decidis reeldoni „La Komencanto", kiu estas pli malpli prespreta kaj almenaŭ kontentigos la preferantojn de la pure „gramatika" metodo.

**Flugfolioj 1 majo:**

Mendis nur 21 sekcioj, krome 2 ĝen. membroj: Boon en Lekkerkerk kaj Visser en Maassluis.
La mendita kvanto estas entute 21.350 ekz. Neuzitaj restas ĉe ni 22.400 ekz. La plej multo da sekcioj do kaŭzis al nia kaso domaĝon de sufiĉe grava sumo. Oni bone komprenu, ke flugfolioj nur estas ne tro multekostaj, se ni povas eldoni gravan kvanton.

**Radio.**

Op 7 Juni a.s. spreekt voor de Vara k-do J. Hippe, hoofdbestuurder van de Grafische Bond over het onderwerp „Esperanto en de arbeidersbeweging".

**Leeszalen.**

Slechts enkele afdelingen hebben nog maar van de gelegenheid gebruik gemaakt, om L.E. te abonneren voor hun plaatselijke leeszaal. Een zeer eenvoudig middel om L.E. en daarmee Esperanto onder de ogen van de leesgragen te brengen.
Het abonnementsgeld van f 1.— per jaar zal voor de meeste afdelingen wel geen bezwaar zijn.
Wij zorgen voor rechtstreekse toezending van L.E. aan uw plaatselijke leeszaal. (adres vermelden!)

---

**UNUECO AŬ KUNLABORO?**

En kelkaj landoj, precipe en Bulgario, Polic kaj Jugoslavio, la laboristaj esperantistoj partoprenas en unuecaj organizoj kune kun la aliaj esperantistoj.
Nerefuteble unueco necesas ankaŭ en la Esperanto-movado kaj laŭ supraĵa rigardo oni emus favori la ideon de unueco de ĉiuj esperantistoj en unu organizo.
Tamen Esperanto ne estas nur lingva afero; tro forte estas ligitaj al ĝi diversaj ismoj.
Principe la Esperantismo, laŭ la Bulonja Deklaracio, estas nur la klopodado enkonduki neŭtralan lingvon en la internaciajn rilatojn kaj Esperantisto estas ĉiu, uzanta la lingvon por kiu ajn celo. Tiu ĉi Deklaracio estis kompromiso inter la idealistoj kaj la t.n. praktikistoj. Zamenhof klare eldiris, ke lingvo, kiu devas servi nur al praktikaj celoj ne havas valoron por li.
Se ni atentas la opinion de multaj esperantistoj, ni same klare konstatas, ke la grandega plimulto uzis siajn tempon, monon kaj energion ne por la intereso de trafiko kaj komerco, sed estas gvidata de pli idealaj motivoj. Ankaŭ la laboristaj esperantistoj ne formas escepton en tio. En la neŭtrala movado oni konas tiun ĉi idean motoron sub la nomo de „Interna Ideo", kia titolis ĝin D-ro Zamenhof.
*La „Interna Ideo" laŭ la neutrala vidpunkto, kiom ajn simpatia, tamen ne kongruas kun la granda idea movado de la socialismo.*
La laboristoj ne povas akcepti la penson, ke Esperanto per si mem povas interfratigi la homaron kaj ke estas nur lingvaj muroj, kiuj kaŭzas militojn kaj interpopolan malamon. Ili plene konscias la gravon de la ekonomiaj kontrastoj tiel inter la popoloj, kiel ankaŭ inter la klasoj kaj iliaopinie, nur tutmonda socialismo, kondukanta la interesojn de unuopaj homoj kaj de tutaj popoloj en unu direkto, anstataŭ interkontrastiganta ilin, povos prezenti bazon por pli justa kaj pli ideala mondo. Laŭ tiu vidpunkto *la lingvaj baroj prezentas malhelpon al la starigo de la socialismo.* Sekve la akcepto de Esperanto signifos gravan, eĉ tre gravan subtenon en la batalo por tutmonda socialismo. Tiu ĉi formo de „Interna Ideo" estis prezentata kaj propagandata sub la nomo „laborista esperantismo" kaj ĝi estis la pravigo kaj defendo de la aparta organiziĝo de la laboristaj esperantistoj.
Eĉ ĝi estis pli ol pravigo kaj defendo, ĝi fariĝis la idea motoro, kiu instigis al aktiveco kaj fervoro. Cu tiu motoro nun eksfunkciiĝis, aŭ ĉu ĝi eble eksfunkciiĝis por iuj landoj? Tio ĉi estas tute absurda ĉar tio signifus malaktualiĝon de la tuta socialismo, ĉu per starigo de tutmonda socialismo, ĉu per plena foriĝo de la socialisma ideo; kaj nek pri unu nek pri la alia estas parolo.
Ekzistas tamen alia kaŭzo de la unuecemo en laboristaj rondoj. En la milito la faŝismo montris sin senindulga malamiko de la Esperantismo, kiel produkto de humanismo kaj malŝovinismo. Pro tio ĉiu esperantisto fariĝis iaspeca kontraŭfaŝisto. Krome en multaj rilatoj la milita batalo ne permesis apartiĝon sed devigis plej diversajn grupojn kuniĝi siajn fortojn, por savi sin kune el la minacanta danĝero de faŝismo kaj naziismo. Tiu ĉi unueco en la batalo vekis kompreneble pli bonan interkomprenon, ĉar oni spertis, ke la diferencoj ne estas tiom grandaj, kiom oni supozis en sia disiĝiteco. Tamen oni tro idealiĝis la homajn interrilatojn, sekve la ideo pri absoluta unueco en penso kaj faro, kiu kuŝas sur la fundo de ĉies idealismo, akiris tro belajn, ne plu realajn kolorojn. Kaj tute nature post la disfalo de la faŝismo multaj esperis, ke ni povos konservi tiun unuecon. Sed oni forgesis, ke nia agado en la milito estis negativa. Ĉiuj estis kontraŭ rasimo, kontraŭ tiranio, kontraŭ diktaturo, kontraŭ, kontraŭ....

**Ne plu temas pri „kontraŭ".**

Nun, post la milito, temas ne pri kontraŭ, sed pri „por". Kaj jen aperas la diferencoj denove. Esti demokrato kaj kontraŭfaŝisto ne signifas esti socialisto. Eĉ la vorto „demokratio" mem ne estas same interpretata. Por burĝo ĝi signifas politikajn rajtojn, sed socialisto aldonas al ĝia senco ankaŭ ekonomiajn rajtojn.
En Polio k.t.p. ĉiuj esperantistoj (ĉu ankaŭ katolikaj?) unuiĝis sub la devizo de demokratio kaj kontraŭfaŝismo, sed tiu bazo tute ne estas kontentiga. Povas esti, ke en tiuj landoj la situacio estas tute alia ol en okcidentaj landoj, sed malfacile estas supozi, ke la antaŭaj burĝaj esperantistoj nun subite ŝanĝiĝis en socialistojn.
Pli verŝajne estas, ke la antaŭaj neŭtraluloj komprenas, ke en tiuj landoj la burĝa movado ne estis plu gvida kaj ke anstataŭe la laborista movado posedas la pli bonan perspektivon kaj pli firman bazon. Sukcesinte altiri la laboristojn al unueca asocio ili kontinuigas sian influon kaj malebligas relativan malprogreson de la neŭtrala asocio, favore al la laborista.
Tion ni ne povas ne nomi granda taktika kaj principa eraro. Ĉar, kia nun estas la situacio en tiuj landoj? Kvankam la pli granda parto de la anaro de tiuj asocioj estas diverspartiaj socialistoj, la asocio mem estas neŭtrala.
Prezentiĝas do la stranga fenomeno, ke plifortiĝo kaj enradikiĝo de la socialista ideo, kondukas ne al plifortiĝo de la laborista esperantisto-asocio, sed al ĝia likvido!
Se estus vera kelkies aserto, ke en tiuj landoj ĉiuj esperantistoj konvertiĝis al la socialismo en iu formo, kial do ne konservi la laboristan asocion kaj likvidi la neŭtralan? Oni bone komprenu, ne estas nia intenco alceli la pereon de la neŭtralaj asocioj, sed estas ja freneze, se ni devus likvidi niajn asociojn por vivantigi neŭtralan.
Ankaŭ en Sovetio antaŭe ne estis loko por neŭtrala organizo, sed ni neniam aŭdis, ke la rusaj kamaradoj intencis mortigi sian asocion, por krei neŭtralan asocion, kiu sen ili ne estus vivipova.
Ĉu ĉi tiu artikolo signifas, ke ni neniel devas kunlabori kun nelaboristaj asocioj? Tute ne! Kie tiuj aliaj posedas ekzistipovon — kaj tiu ekzistipovo devas montriĝi per la propra forto de tiuj nesocialistaj esperantistoj — ni tute ne devas apartigi nin je ĉiu prezo.
Ekzistas plurrilate komunaj interesoj, ni nomu nur la laboron por enkonduki esperanton en la lernejon, sed tio ne estu motivo por plena kunfandiĝo per kiu ni fariĝus malliberuloj de nia unueciĝemo.
Ni konservu niajn proprajn adekvatajn organizojn, en kiuj plene manifestu sin la laborista esperantismo. *Sur komuna tereno ni lojale kaj harmonie kunlaboru kun neŭtralaj kaj alitendencaj organizoj por plenumi tiujn taskojn, kiuj posedas saman valoron por ni ĉiuj, sendepende de politika aŭ religia koncepto.*
Pri la praktika eblo de tia kunlaboro ne necesas dubi, se la kunlaborantoj pretas respekti siajn reciprokajn vidpunktojn.
En Nederlando jam funkcias dum unu jaro tia kunlabora komitato. Kvankam unu jaro ne sufiĉas por doni absolutan pruvon, ni konvinkiĝis, ke la eblo ekzistas. Tial ĉi tiu sistemo ŝajnas al ni imitinda por aliaj landoj, efektiviginda kaj efektivigebla en ia formo ankaŭ sur internacia tereno. W. F. K.

##  EL LA DISTRIKTOJ

**DISTR.: NOORD-HOLLAND.**
La distrikt-estraro preparas noktpromenon en la ĉirkaŭaĵo de Haarlem en la nokto post la 21a de Junio kaj, se eblos, ekskurson al Hilversum dum la 29a de Junio. Pluajn detalojn via sekcia estraro ricevos en la Informa Bulteno de nia distrikto.
Atentu, estas alia distrikta sekretario, nome: K. Wilgenhof, Wilhelminastr. 28, Beverwijk.

**DISTR.: ZUID-HOLLAND.**
La Sudhollanda Distrikto aranĝos la 5an kaj 6an de Julio semajnfinon en Hago. La Haga teatra grupo „La Verda Masko" kunlaboros. Ĝi prezentos novan repertuaron. La fama Haga orkestro „Animata", en kiu kunlaboros diversaj virtuozoj — akordeono, klarineto, violono k.s. ankaŭ ĉeestos.
Dimanĉon la 6an ni faros ekskurson al Scheveningen kaj vizitos panoramon „Mesdag". La partoprenkostoj estas nur f 0.50. La partoprenontoj mem zorgu nur por pano dimanĉe. Nur malsano povos reteni vin. La semajnfino havas la celon: distri vin kaj plifortigi la internan kunlaboron. Persona kontakto efikos bone kaj portos fruktojn por nia movado. La semajnfino estu manifestacio de nia povo kaj volo. Anoncu vin *tuj* ĉe k-do Henk Valckenier, Daendelstraat 64, Den Haag. Pagu per poŝtmarkoj aŭ poŝtmandate al k-do Koorn, Ruysbroekstraat 232, Hago. Por specialaj informoj aŭ komunikoj oni turnu sin al k-do D. Varkevisser, Zandvoortstraat 11, Scheveningen.

##  EL LA SEKCIOJ

**BEVERWIJK, Sekr.: C. Matersweg 13.**
Pro la fino de la vintrokurso ni okazigis kursfinfeston ĉar la kurso liveris 15 novajn anojn.
La kursgvidinto k-do Meyer ricevis librojn de la kursanoj kaj sekcio. Lia edzino ricevis grandan torton.
K-do E. Hutter gajnis la unuan premion por la plej bona ekzameno kaj k-do F. Polder la duan.
Post kanto kaj deklamoj ni priparolis kun niaj novaj anoj niajn planojn pri nia proks. festo pro la 25 jara ekzisto de nia sekcio.

**ENSCHEDE. Sekr.: Van Coevordenstraat 39.**
Pro la finiĝo de la kursoj, ni aranĝis la 8an de Majo agrablan kunvenon. Per kantado, muziko prezentado kaj lernado ni pasigis la vesperon. Taso da teo kun kuketo pli altigis la intiman sferon.
Ni povis enskribi *12 novajn gemembrojn*. Al niaj malnovaj membroj ni petos plifortigi nian sekion, per vizito al la kunvenoj kaj kunlaboro.

**ZAANDAM—ANTAŬEN.**
**Sekr.: Gov. Flinckstraat 41.**
Okazos ekster-ordinara kunveno je Merkredo la 4an de Junio, je la 7.30a horo en la konstruaĵo de la ludgarden-unuiĝo „Het Zuiden", Ds. Baxstraat. En la ĝardeno ni estos fotografataj nepre antaŭ la 8a horo. La fotografaĵon ni bezonas okaze de nia jubileo estonta. Tial do ni kompreneble atendas ĉiujn niajn gemembrojn. Kursgvidantoj instigu siajn gekursanojn ankaŭ ĉeesti. Abonantoj de la Skriba-Kurso ankaŭ estas bonvenaj. La kunveno estas duoble grava, ĉar dum tiu kunveno ni komunikos la rezulton de la unua periodo de la laboro per nia gratul-registro. Vi ĉiuj kunprenu vian registron kune kun la mono. Poste ni pritraktos ĉion pri nia Esperanto-Semajno, la loĝado, ekskursoj k.t.p. Ĉar ni nun devas fari definitivajn decidojn. Neniu do forrestu. Pro la ĉiam kreskanta laboro ni decidis, ke ni nun ĉiun Merkredvesperon kunvenas en nia ejo Oostzijde 59. Notu la novan adreson de nia sekretario.

##  S.A.T. KOLONO

**SAT-rondo Amersfoort.**
Dimanĉe la 27an de Aprilo nia rondo kunvenis, k-do v. d. Stolpe parolis pri „La signifo de sennaciismo".

**SAT-RONDO AMSTERDAM**
Intencas la 29an de junio ekskursi al ‚Het Gooi". SAT- anoj, ankaŭ ekster tiu urbo, atentu la daton!
Pluraj komunikoj sekvos en la distrikta bulteno A'dama k.t.p. Ne-SAT-anoj ankaŭ estos bonvenaj!

H. Oudenhooven Bishoff,
Bestevaerstraat 127³.

**Stariĝis S.A.T.-rondo en Dordrecht.**
Ni kunvenos la duan kaj kvaran ĵaŭdon de ĉiu monato hejme ĉe unu el la anoj laŭvice. Geesperantistoj dordreĥtaj aniĝu al nia rondo. Anoncu vin ĉe **S-ro W. Koorneef, Drievriendenhof No. 1, Dordrecht.**

**JU-KO.**
**Sekr.: Langereis A 31 Hoogwoud N.-H.**
„Najbaro intima estas pli bona ol amiko malproksima".
Tiu ĉi nederlanda proverbo esprimas veron, sed ankoraŭ pli bona estas amiko intima! La vivo sen amikoj estas nur mizera vivo. Ankaŭ ni, Asocio de Laboristaj Esperantistoj havas amikojn, eĉ multajn amikojn. Sed ĉiam ni klopodu pligrandigi nian amikaron, nian F.L.E.-Amikaron! Kiel vi devas fari tion, vi demandas? Sed amiko, tio estas ja tre facila tasko! Dum niaj renkontiĝoj, dum niaj semajnfinoj kaj ekskursoj ni renkontas multajn gejunulojn, kiujn ni certe deziras konsideri kiel niajn amikojn. Vi sendube legis pri la granda kampanjo kiu okazas nun, celante varbi amikojn por nia F.L.E.-amikaro. Vi scias la kondiĉojn, ĉu ne? Ĉiu ne-esperantisto povas aniĝi al nia F.L.E.-Amikaro por morale kaj finance subteni nian laboron. Li pagas kotizon de minimume 25 cendoj jare.
Kaj vi sciu, ke ni per nia varbado subtenas ne nur nian asocion, sed ankaŭ JU-KOn! Ĉar 25 % de la jarkotizo estas destinita por nia JU-KO KASO! Do geamikoj, dum niaj renkontiĝoj vi ĉiam kunportu kvanton da aliĝiloj kaj vi varbadu. La enskribitajn aliĝilojn *kun la MONO* vi sendu tuj al (provizore): *A. M. D. Korff, Bestevaerstr. 123 hs., Amsterdam-West.*
Vi ensendu NUR la DU SUPRAJN PARTOJN de aliĝilo, la SUBA PARTO estas kvitanco por la varbito, kaj vi do tuj donu tion al nia nova amiko! La F.L.E.-Amikoj ricevos ĉiukvaronjaron specialan gazeton pri Esperanto, „La F.L.E.-Amiko". La unua numero aperos en Junio, do vi jam tuj post la aniĝo povos doni al la varbito la gazeton. Do geamikoj, vi petu la deziratan kvanton de aliĝiloj.
La ĉefestraro donacos al la grupoj kiuj estos varbintaj la plej grandan nombron da Amikoj, belan esperanto-flagon.
JU-KO anoj! Zorgu ke unu flago estos por ni. Iam ni flirtigu fieraj la flagon, kiu montros al la mondo nian fortan laboremon por bona afero!

Ni informas niajn anojn ke nia sekretario estas elektita por reprezenti JU-KOn en la asocia konsilantaro.
Ŝparkartoj por nia ŝparkaso estas akireblaj po 25 cendoj ĉe nia kasistino, Tiny Weij, Julianalaan 18, Bergen aan Zee.

**LA LOTUMADO EN HEERLEN.**
La posedanto de la JU-KO-gazeto kun la numero: 85 sendu sian gazeton al nia sekretario kiu sendos la premion. (Libro el la Romanserio de la Libro-Servo). Post la unua de julio la ensendo ne plu valoros.

**RADIO.**
La nederlanda radio-stacio Hilversum (N. C. R. V.) disaŭdigos Esperanto-programon je la 6a de junio 1947, vespere de la 18.45—19.00 horo (17.45—18.00 h. laŭ mezeŭropa horsistemo, por Anglujo 19.45—20.00 h.) sur ondo 415 m.
Parolos S-ro J. D. Brakel el Rotterdam, ĉefestrarano de K.U.N.E.; rubriko: „La Evangelio per Esperanto."
Oni dankskribu al: NCRV, sekcio Disaŭdigo, Poŝtkesto 5, Hilversum.



*Svislando*. Radio-Stacio Sottens, 443,1 m. *Esperanto-kurso. La disaŭdigoj okazas merkrede matene de 6.55 ĝis 7.10 h. met.* por ebligi al ĉiuj la aŭskultadon de tiu kurso, la merkredaj lecionoj *estas ripetitaj vendrede vespere de 22.35 ĝis 22.50 h. met. (svisa tempo).* Direktu korespondaĵojn al: *Société suisse de Radiodiffusion, Studio de Genève, Genève.*

**INVITO.**
De la 19a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto 1947 ni aranĝos en Doksy ĉe Mácha-lago, situanta en ĉarma regiono de Bohemio, ĈSR, someran lernejon kaj seminarion, nunjare ankaŭ por **eksterlandaj gastoj**. Direktoro de la lernejo kaj seminario: Ph. Dr A. Pitlik, Esp. lektoro de la Teknika Altlernejo en Praha. Sentraduka instruado, unuagrada kurso laŭ Ĉe-metodo.
**Eksterlandaj gastoj tre kore bonvenigataj rajtas partopreni senkotize.** Salutkartoj por letervespero petataj. Aliĝoj al: Václav Špür, disponanto de ŝparejo, Doksy ĉe Máchalago, Bohemio, Ĉeĥoslovakio.

**INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN SVEDIO.**
Svedio invitas al internacia junular-kunveno de 12—15 Julio ĉi-jare en la bela regiono de Kolmarden/Jursla apud la urbo Norrköping. Ĝi okazos tuj post la internacia somerkurso en Skövde. Ĝuu tre agrablan restadon en la bela Svedio, vizitante unue la somerkurson kaj poste la junularkunvenon. Ĉiuj kostoj por la restado en Norrköping estas 15 sv.kr. Oni ricevos manĝajon trifoje tage. La junaj partoprenantoj loĝos en a. tendoj, b. esperantista somerhejmo, c. provizora ligno-konstruaĵo, d. ĉe esperantistoj en la regiono.
La programo estas tre varia.
Eksterlandanoj sin anoncu al S-ro K. E. Andersson, Jursla 5, ABY. Se vi volas kontribui al la programo, b.v. mencii tion.
La Sveda Esperanto-Federacio sendas al vi ĉiujn sciigojn pri detaloj, vojaĝeblecoj k.t.p.

**Amika Internacia Renkontiĝo**
okazos de 13—22 Julio en Angers. Kostoj 150 frankoj potage (komuna dormejo kaj nutrado) fr. 200.— potage kun aparta ĉambro. Aliĝprezo fr. 100.—. Jam venis aliĝoj el diversaj landoj. Skribu al F-ino Nouais, 28 boulevard Descazeaux, Angers, Francio.

##  ANONCOJ

Deziras korespondadi kun aliaj popoloj: Hugo Kühnel, Erfürt, Hamburgerstrasse 14, Germanio.

Deziras korespondadon kun Holanda esperantisto, fraŭlino aŭ samideano: Antonio de Korŝoŝ, inĝeniero grafikisto, Lorinci, Templom ter 25, Hungarujo.

Gevraagd 2 exemplaren
„LA VERDA KORO"
van Julio Baghy.
Deze zijn bestemd als studieboekjes.
Brieven met opgaaf van prijs aan W. D. FELLER, Westwoud.